

Claude GACOND kun Michel FRÉSARD:
Esperanto en la tridekaj jaroj, kaŭzo de la konfliktoj
Radioprelego de Claude GACOND kun Michel FRÉSARD, SRI, 1986.01.18
<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-161/Radiokasedo-161-2-86-B-1004-Claude-GACOND-Michel-FRESARD-Esperanto-en-la-tridekaj-jaroj-kauzo-de-la-konfliktoj.mp3>

Cl.- Parolas Claude GACOND kaj Michel FRESARD nome de Svisa Radio Internacia.

Hodiaŭ ni revenu al nia studo pri la esperanto-vivo antaŭ 50 jaroj, do en la jaroj tridekaj.

M.- La pasintaj lecionoj menciis kelkfoje la neakordigeblajn opoziciojn, kiuj karakterizis la neŭtralan esperanto-movadon. Ĉu vi povus klarigi la realan kaŭzon de tiuj konfliktoj?

Cl.- Malgraŭ sia espero je mondo pli bona la esperantistaro travivis multajn konfliktojn, kiujn ĝi ne bone komprenis. La esperanto-movado estas fakte socio, kiu devis ĉion mem inventi. Kaj ne estas facile funkciigi tutmondajn instituciojn, ĉefe kiam eterne mankas la mono en ĉies poŝoj kaj en la kaso de la lokaj, fakaj, naciaj kaj internaciaj organizaĵoj. Tiu manko da financaj rimedoj tutcerte akriĝis la konfliktojn en la tridekaj jaroj. Sed la ĉefa konfliktiga kaŭzo estis fakte politika. Parto de la esperantistoj restis kaj volis resti fidelaj patriotoj naciistaj, dum aliaj strebadis al neŭtrale homa supernaciismo. Kunvivigi tiujn ĉi du civitanismojn en sama organizaĵo ne estas eta afero, ĉefe kiam reekcitiĝas la ŝovinismoj, kiel okazis en la jaroj tridekaj.

M.- Sed ĉiuj sin proklamis samideanoj.

Cl.- Jes, samideanoj, amikoj, fratoj. Rilate al la lingva sinteno ili havis la saman ideon. Sed la lingvo estas nura instrumento. Ne ĉiuj intencis utiligi ĝin por la sama celo. Zamenhof klare senvualigis siajn intencojn en la dua Universala Kongreso en Ĝenevo en 1906.

M.- Kaj li tutcerte tre profunde influis Hector Hodler kaj Edmond Privat.

Cl.- kaj multajn aliajn svisojn: Edouard Stettler interalie. Tiuj homoj konsideris la organizaĵon Universala Esperanto-Asocio kiel edukejon al homaranismo kaj al supernacia kunlaboro. Ilia UEA publikigis dum la tuta unua mondmilito alvokojn, por ke la esperantistoj restu super la konfliktoj kaj ŝovinismoj, konduku kiel Eŭropanoj, kaj ne kiel ekcivitaj nacioj. La patriotismo de tiuj homoj estis jam tutplaneda. Ludoviko Zamenhof, Hector Hodler, Edmond Privat, Andreo Cseh, Edouard Stettler personigis tiun ĉi sintenon, kiun la internaciistoj konsideris kiel utopia, nerealisma.

M.- Kaj kio do estis la sinteno de la internaciistoj?

Cl.- Ili opiniis, ke helplingvo kiel esperanto faciligos la komercajn kaj homajn rilatojn inter la nacioj, sed antaŭ ĉio ili volis resti praktikaj homoj. En Zamenhof, Hodler, Privat ili vidis profetojn, sed la nuna mondo tre foras al ilia sonĝo. La internaciistoj sin proklamis realistoj. Ofte ilian religian kredon ŝokis la homaranisma proklamo de Zamenhof. Kiam oni havas la firman konvinkon aparteni al la vera religio, kiam oni fieras pri siaj gento, lingvo, lando, oni ne povas akcepti la celadon de neŭtrale homa religio, kaj oni volas defendi la naciajn konkerojn. Esperanto utile servu al la diskonigo de tiuj spiritaj kaj faktaj valoroj.

M.- Per viaj klarigoj mi pli bone komprenas, ke temis fakte pri du politikaj kaj religiaj orientiĝoj malfacile akordigeblaj.

Cl.- Hector Hodler volis, ke el la tuta tero la esperantistoj povu senpere aliĝi al UEA, al Universala Esperanto-Asocio, kiu estu je ilia servo, kiu estu ilia kunigilo super la diferencoj gentaj, rasaj, religiaj, klasaj, ktp. Tion ĉi li nomis neŭtraleco. La internaciistoj opiniis, ke estus pli efike havi potencajn naciajn esperanto-organizaĵojn, kiuj je la landa nivelo modele organizu la esperanto-vivon. Kaj tiuj landaj organizaĵoj formu internacian ligan pere de elektitaj delegitoj. Ilia kreaĵo en 1936 ricevis la nomon Internacia Esperanto-Ligo.

M.- Ili do ne akceptis la ideon, ke la landanoj rekte aliĝu al UEA.

Cl.- Tiu ĉi senpera aliĝo al UEA estis ne nur kritikita. Ekde 1923 ĝi estis malpermesita por la sovetianoj, ekde la tridekaj por la italoj kaj poste por la germanoj. Kaj tre aktive laboris favore al tiu malpermeso du homoj, kiujn oni elektis en 1934 por formi la komitaton de UEA. La naziano d-ro bankisto Anton Vogt tre aktive laboris en la hitlera Germanio por unue malfondigi la laboristan esperanto-movadon, poste por konformigi la Germanan Esperanto-Asocion al la naci-socialisma idealo. Jam antaŭ lia elekto en 1934 li kontribuis al la elimino de la judoj el la esperanto-movado. Same d-ro inĝeniero Rinaldo Orengo malebligis al la italoj senpere aparteni al UEA. Pri tio okazis disputo inter li kaj Hans Jakob kelkajn minutojn antaŭ lia elekto al la Komitato de UEA en 1934 kaj antaŭ la demisio de Edouard Stettler kaj Hans Jakob. Eble vi laŭtlege tiun ĉi protokol-eron, kiu montras, kiel akriĝis la rilatoj inter la esperantistoj el ambaŭ tendencoj. Hans Jakob, kiel direktoro de UEA, ĝuste plendis pro tiu malpermeso al la italoj resti membroj de UEA:

M.- "Oni poste parolis pri la akcepto de la Itala Federacio, vivante en specialaj cirkonstancoj. S-ro Jakob raportis pri la petskribo farita de UEA al la itala registaro. D-ro Orengo energie protestis, ke UEA, malhelpante la Federacion, agis memstare, sen ia konsento pri tio kun la nacia organizo. La Centra Oficejo krom tio tute ne plenumis apartan kontrakton faritan kun ĝi. La Federacio antaŭvidas aliĝi en 1934 al la internacia organizo. S-ro Stettler proponis, ke pro la Kongreso de Romo en la venonta jaro, oni akceptu la Italian Federacion jam nun. La kunsido aplaudis la proponon. La Federacio estis akceptita, D-ro Orengo indikita kiel ĝia komitatano en UEA."

C1.- Tuj poste okazis la elektoj.

M.- Pro nesufiĉaj voĉoj estis ne-elektitaj S-roj Cseh, Karsch, D-ro Privat. Aŭdinte la rezulton, S-ro Stettler, prezidanto de UEA, tre energie esprimis sian malkontentecon, deklarante konsideri ĝin manko de rekono pri la farita laboro al la tri personoj, de li mem proponitaj. Li atentigis speciale pri la meritplena, ampleksa agado de S-ro Karsch, ĝis nun vicprezidanto de UEA. Sentante sin solidara kun la ne-reelektitoj, post deklaro de s-ro Karsch, li demetis la funkcion de prezidanto de UEA kaj ambaŭ forlasis la kunsidejon. Samtempe leviĝis proteste S-ro direktoro Hans Jakob, anoncanta, ke solidare kun la ĝisnuna prezidanto li demetas sian postenon kiel direktoro. Ankaŭ li forlasis la ĉambron.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond kaj Michel Frésard diras al vi: ĝis la venonta sabato!